# NIA PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com


**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**


**JANUARO/FEBRUARO 2015** **Nro. 102 (1/15)**



## JUNTA GENERAL EXTRAORDINARIA DE SOCIOS.

Por la presente, se convoca a los socios del Grupo Esperantista de Bilbao a la Junta General Extraordinaria, que tendrá lugar en la sede social el **Viernes 6 de Marzo de 2015, a las 19,30 h.**, con arreglo al siguiente

**ORDEN DEL DÍA**:

1.Aprobación de la propuesta de nuevos Estatutos, presentada por la Junta Directiva a instancias del Gobierno Vasco.

2.Ratificación del nombramiento de nuevo Vicepresidente.






**LOKE ...**

## KRISTNASKA LOTERIO.




Unu plian jaron, ni ne sukcesis ricevi premion en la tradicia kristnaska loterio. Bedaurinde, tiu fakto ankaŭ iĝas tradicio.

Malgraŭ tio, tutkore ni dankas la sindonemon de tiuj, kiuj ĝin aĉetis, speciale de tiuj kiuj petis biletojn disde diversajn urbojn.

## "FUNDACIÓN ESPERANTO" MONHELPAS LA GRUPON DE BILBAO.

Denove la Grupo de Bilbao devas danki al "Fundación Esperanto" kaj tre speciale al nia amiko Lorenzo Noguero pro subvencio, kiun Ĝi transdonis al ni pro instalo de lifto ĉe nia sidejo. Ĉi-foje la subvencio estis 400-eŭra.

## Porinfanaj E-libroj el Eŭskio.

Libroservo de UEA anoncas du librojn por infanoj eldonitaj ĉe la eŭska eldonejo Erroteta. Ambaŭ estas tradukitaj el la eŭska far **Aitor Arana**.

"Kiel korekti instruistinon" kaj "Mi loĝas en du dumoj", Miren Agur Meabe, *Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj*, Erroteta, 2014. Du knabinoj havas problemojn - unu en la lernejo, la alia hejme. Prezo: 9.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: http://katalogo.uea.org?inf=403

"Usoa venis fluge kaj Sola kaj senvosta", Patxi Zubizarreta, *Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj*, Erroteta, 2014. Usoa kaj Sola estas knabinoj, kiuj havas iom nekutimajn travivaĵojn. Prezo: 9.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: http://katalogo.uea.org?inf=1874

Biografio de Aitor Arana: http://www.euskomedia.org/aunamendi/18623

*(Dario Rodriguez. 21/01/2015)*

## E-ARANĜOJ 2015.

**01-03 majo**. 74a Hispana Kongreso. Cullera (Valencia).

**25 julio - 01 Aŭgusto** 100-a UK, Universala Kongreso en Lille, Francio.

**22 - 29. aŭgusto**. Itala Kongreso de Esperanto - en San Benedetto del Tronto, Italio. Itala kongreso de Esperanto. Inf.: Laura Brazzabeni kongreso@esperanto.it

# ZAMENHOFA FESTO-TAGO.

Kiel anoncite, la pasintan 13-an de decembro, ĉirkaŭ 20 gesamideanoj kunvenis en nia sidejo por celebri la naskiĝtagon de Dro. Zamenhof. Post entuziasmiga parolado de Eduardo Larrouy, la ĉeestantoj havis la okazon gustumi la diversajn frandaĵojn alportitaj de la partoprenantoj mem.




*La ĉeestantoj pozas antaŭ la komuna vespermanĝo.*




*Eduardo Larrouy vigle kaj entuziasme alparolas la bilbaoajn samideanojn*.

**H.E.F.**

## Hispana Kongreso.

La venonta Hispana (kaj Valencia) Esperanto-Kongreso okazos en la tre turisma urbo Cullera (Valencio) komence de majo.

Ĉiuj ĝisnunaj informoj disponeblas en la retejo http://esperantoval.org/cullera2015/eo/
inklude de provizora programo, kotizoj, aliĝmanieroj, ktp. Tre baldaŭ oni havos pliajn novaĵojn.

Se vi uzas la socian reton Fejsbuko, la evento jam disponas je paĝo tie https://www.facebook.com/events/336500613218723/

Se vi havas dubojn, aŭ volas iel kontakti la organizantojn, ne hezitu fari ĉe la adreso kongreso@esperanto.es.

*(José Antonio del Barrio-Federación Española de Esperanto (HEF). 05/02/2015)*

## Nova Esperanta vortaro enreta.

Eblas konsulti novan interesan vortaron enrete (Esperanto<>Iberiaj lingvoj):

https://es.glosbe.com/es/eo/ (hispana>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/es (esperanta>hispana)
https://es.glosbe.com/pt/eo/ (portugala>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/pt (esperanta>portugala)
https://es.glosbe.com/ca/eo (kataluna>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/ca (esperanta>kataluna)
https://es.glosbe.com/gl/eo (galega>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/gl (esperanta>galega)
https://es.glosbe.com/eu/eo/ (eŭska>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/eu (esperanta>eŭska)
https://es.glosbe.com/an/eo/ (aragona>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/an (esperanta>aragona)
https://es.glosbe.com/ast/eo/ (asturia>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/ast (esperanta>asturia)
https://es.glosbe.com/oc/eo/ (okcitana>esperanta)
https://es.glosbe.com/eo/oc (esperanta>okcitana)

Ankaŭ en multaj aliaj lingvoj.

*(Darío Rodríguez. 22/12/2014)*

## Invito al oficiala kunmemoro.

Hispana Esperanto-Federacio estis invitata de la Pola Ambasado ĉeesti la kunmemoron de la 70-a datreveno de la liberigo de la koncentrejo de Aŭŝviĉo, kiu okazos venontan lundon en la Fakultato de Filologio en Madrido:
http://www.culturapolaca.es/#es,wydarzenia,884

*(José Antonio del Barrio, Prezidanto de HEF. 22/01/2015)*

## Kataluna entrepreno elektas sian nomon en Esperanto.

Vidu ĉe: http://youtu.be/tevpvUA5D14

*(María Zocato. 15/01/2015)*

## NOVAJ PERSPEKTIVOJ, MOTO DE LA 74a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO.

La 74a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu kune kun la Valencia Kongreso de Esperanto disvolviĝos en la turisma apudmediteranea urbo Cullera inter la 1a kaj 3a de majo, prezentos kiel moton "Novaj perspektivoj". La renkontiĝo debatos la defiojn kiujn alfrontas la Esperanto-movado en tiu ĉi ŝanĝiĝanta socio, kaj kiel ilin respondi.

La Kongreso antaŭnelonge inaŭguris sian retan paĝon, kie montriĝas la progresoj de la organizaĵo, kaj oni povas aliri provizoran programon. Oni ankaŭ disponas je informoj pri la aliĝmanieroj.

La limo por la unua aliĝperiodo, kun rabatitaj kotizoj, finiĝas la 15-an de februaro. Ne lasu ĉion por la lasta momento.

Ĉiuj informoj troviĝas ĉe la retejo http://esperantoval.org/cullera2015/ kaj ĉe la retadreso kongreso@esperanto.es.

*("La bitbulteno" de HEF. Nro. 13. 15/01/2014)*

## ALEX ESCOBEDO, NOVA PREZIDANTO DE HEJS.

Dum tiu ĉi monato decembro estis elektita Alejandro Escobedo kiel nova prezidanto de **Hispana Esperantista Junulara Societo**, HEJS, la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio. Alex naskiĝis en 1992, loĝas en Madrido kaj diplomitiĝis pri Tradukado. Li lernis Esperanton en oktobro de 2010, kaj trapasis la ekzamenojn de la lingvo en la nivelo C1 dum pasinta Hispana Kongreso.

En intervjuo kiun anoj de HEF povos baldaŭ legi en *Boletín*, li montris diversajn agadliniojn, por kunlaborigi la junajn esperantistojn en Hispanio en la disvastigo de Esperanto.

La anoj de HEF kaj HEJS dankas la ĝisnunan prezidanton, Chus García, pro lia agado, kaj gratulas lin pro lia ĵusa patriĝo, kiu nun probable forprenos parton de la tempo kaj energio kiujn li ĝis nun dediĉis al la asocio

*("La bitbulteno" de HEF. Nro. 13. 15/01/2014)*

## Nova retejo kun nomo en Esperanto.

Jen nova iniciato de retaktivismo (ĉu kiberaktivismo?), KOLOKVO; tiel ĉi, en Esperanto. Ĝi venas el Vitorio.

http://www.kolokvo.com/


http://www.noticiasdealava.com/2015/01/29/araba/causas-que-ya-salieron-adelante-un-paso-mas-hacia-el-ciberactivismo

Esplorinde ĉu indus kunlaboro, ĉu per tradukado, ĉu per kampanjoj.

*(Toño del Barrio. 01/02/2015)*

# TRA LA MONDO …

## FORPASO DE KEP ENDERBY. (1926-2015)



Kredeble vi jam ricevis la gazetaran komunikon pri la forpaso de nia antaŭa Prezidanto Kep Enderby. Ni dediĉu dankan penson al la memoro de tiu eminenta australiano, nia unua sudhemisfera Prezidanto, kiu kunportis profundan pasion por socia justeco al siaj diversaj movadaj roloj.

Estas iom strange rakonti, ke mi unue ekkonis Kep (kaj lian edzinon Dorotea) kiel lia instruisto en NASK, la nord-amerika somera kursaro. La strangeco kuŝas en tio, ke li jam tiam plenumis elstaran karieron en la australia justico, estis ministro en la Whitlam-registaro de la fruaj sepdekaj jaroj, fariĝis juĝisto en la supera kortumo de Nova Sud-Kimrio... kaj mi estis nur doktoriĝa studento pri edukado en Kanado, eĉ se mia movada biografio estis jam sufiĉe longa. Nu, unu el la donacoj de Esperanto konsistas en tiaj memorindaj renkontiĝoj. Ĉar Kep ja estis memorinda, kun liaj penetraj okuloj, raspe profunda vocho, ŝpruca inteligento kaj fortaj konvinkoj. Mi ĉiam poste konsideris lin amiko, kvankam la sorto ne volis, ke niaj vojoj poste denove kruciĝu. En la kongreso, kiu elektis lin Prezidanto, mi demisiis el la Estraro kaj la Komitato, pro troa okupiteco pri niaj junaj infanoj kaj la ĝermo de nova kariero, kaj mi poste ne revidis lin.

Verŝajne ne ekzistas facilaj prezidantecoj, sed la estrara periodo de Kep efektive estis aparte malfacila. Tamen nun pli indas substreki la dankindan fakton, ke nia movado sukcesas allogi kaj teni tiajn originalulojn, kiuj riĉigas nian komunumon per siaj ideoj kaj valoroj. Kep estis samtempe lojala UEA-membro kaj konvinkita adepto de Sennacieca Asocio Tutmonda, du asocioj kiuj longe tenis sin disaj. Li estis tia homo, kiu ne akceptas barojn. Bona enkorpigo, do, de la kerna idearo de nia Asocio kaj nia lingvo.

Nome de la Estraro, mi esprimas niajn kondolencojn al lia vidvino Dorotea kaj al la australia Esperanto-movado.

*(Mark Fettes, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. 08/01/2015)*

## JAM 1570 ALIĜIS AL LA 100-A UK.

La aliĝado al la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en la franca urbo Lillo (25 julio – 1 aŭgusto 2015) evoluas ŝtorme. Ĝis la 19-a de januaro estis registritaj 1570 aliĝintoj el 66 landoj. Duonan jaron antaŭ sia komenco la jubilea UK estas jam klare pli granda ol la lastaj kvin UK-oj kaj en la historia statistiko ĝi lasas sub si jam 41 kongresojn.

Kun 464 aliĝintoj la kongreslando Francio okupas senrivale la unuan lokon en la provizora statistiko. Pli ol 100 aliĝojn liveris ankaŭ Germanio (130) kaj Japanio (104). Ĝis la UK al la "klubo de 100" antaŭvideble aldoniĝos ankaŭ Belgio kaj Pollando (po 68), Brazilo kaj Nederlando (po 63), Italio (44) kaj Britio (40). Aliaj pintaj landoj meze de januaro estas Hispanio (39), Korea Respubliko (35), Svislando (34), Ĉinio (30), Danio kaj Finnlando (27), Hungario (26), Svedio (24), Irano kaj Rusio (po 23), kaj Usono (21).

Al la UK en Lillo eblas aliĝi rete aŭ uzante la paperan aliĝilon, kiun oni povas peti de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando). La 1-an de januaro ekvalidis la prezoj de la dua kotizperiodo, kiu daŭros ĝis la 31-a de marto.

*(Gazetaraj komunikoj de UEA, 19/01/2015)*

## ESPERANTO-RADIOREKLAMO - DUM 6,5 HOROJ...!

Ekde la 17-a de januaro 2015, dum 4 semajnoj, 2140 foje denove sonos 11-sekunda radioreklamo pri Esperanto en 34 hungariaj radiostacioj!

Laŭ la spertoj de la pasintjara kampanjo ni denove lanĉis reklamkampanjon en lokaj radiostacioj, kie la sumigita elsendotempo estas (2140*11 sek) 392 min, alivorte 6,5 horojn – kiu laŭ mia scio signas iun mondan rekordon en Esperantujo...

Kompiladon de la radiostacia listo ni faris tiel, ke la kampanjon partoprenu ĉefe malgrandaj, lokaj stacioj, kiuj atingas personojn, inetersiĝantajn pri loka socia vivo en ne-grandaj urboj kaj urbetoj – kie espereble la reklama bruo de amaskomunikiloj estas malpli intensa...

La sondosiero de la reklama kampanjo estas trovebla ĉi tie:
http://www.eszperanto.hu/media/radioreklam-10mp-ls.mp3
*(*Traduko*: Por havi lingvoekzamenon aŭ krompoentojn por la universitata enira ekzameno plej rapide oni povas lerni la lingvon Esperanto. Provu ankaŭ vi la interretan kurson pri Esperanto: www.esperanto.hu -- www.esperanto.hu )*

*(László Szilvási, Lingvo-Studio, L.S. www.eventoj.hu. 19/01/2015)*

## E-Lernolibro laŭ epub.

La fama esperanta verkisto William Auld verkis interesan lernolibron "Paŝoj al plena posedo". Mi kunsendas ĝian version laŭ formato epub. Ĉi formato taŭgas speciale por elektronikaj librolegiloj, sed eblas ankaŭ ĝin legi per komputilo, poŝtelefono aŭ tableto: ekzistas pluraj aplikoj troveblaj per jena Google-serĉilo: http://goo.gl/KSg4QK

*(Darío Rodríguez. 19/01/2015)*

## Esperantistaj viktimoj de Holokausto.

Ĵaude la 29-an de januaro oni kunmemoras la 75-an datrevenon de la murdo de Adam Zamenhof, la sola filiĉjo de Ludoviko. Du tagojn post la Internacia Tago kiu kunmemoris la viktimojn de Holokaŭsto.

Mi ĵus kreis mallongan artikolon pri Adam en la hispanlingva Vikipedio: https://es.wikipedia.org/wiki/Adam_Zamenhof.

Pri la esperantistaj viktimoj blogis Javier Guerrero tie ĉi:
http://enesperantujo.blogspot.com.es/2015/01/nomon-eternan-al-ili_27.html
Ankaŭ troviĝas artikolo hispanlingva en la retejo de HEF:
http://www.esperanto.es/hef/index.php/42-noticias-espanol/articulo/257-esperanto-y-dia-del-holocausto

*(Toño del Barrio. 29/01/2015)*

## Plia materialo en Bitoteko.

Kun permeso de Miguel Gutiérrez Adúriz, HEF aperigis en Bitoteko du dokumentojn rilatajn al lia lernolibro publikigita en 1995.

- Clave de los ejercicios (ekzerco-solvoj): http://hdl.handle.net/11013/4495
- Sonregistro de la legaĵoj: http://hdl.handle.net/11013/4487

*(Manolo Parra. 14/02/2015)*

## E-Kursoj en universitatoj kaj altinstitutoj.

Mi NE PLU sisteme ĝisdatigos informojn pri E-kursoj oficiale organizitaj en universitatoj kaj altinstitutoj *:* tute fiaskis mia celo, kiam mi komencis tian kompiladon : uzi tiajn informojn por prepari dosieron dum kontaktoj kun lernejaj instancoj, kaj por interrilatigi universitatajn E-studentojn i.a. kaj precipe por fakaj celoj.

Pli kaj pli mi havas la impreson, ke Esperanto restas nur kluba amuzilo ! Pro tio ni bedaŭru ke pluraj fakaj E-asocioj estas nur senutilaj surpaperaĵoj.

Tamen, mi daŭre pretas diskonigi sciigojn pri E-agadoj sine de universitatoj kaj altinstitutoj ... kiam mi ricevas informojn tiurilate, kiel mi jam faras.

Fakte, kiel mi skribis en mia kompilado de januaro 2014 : por plibonigi kompiladon de E-kursoj en la lernejoj, endus ke ĉiu landa ILEI-sekciestro faru tion en sia propra lando kaj ke, je fiksita limdato, la rezultoj estu senditaj al kunordiganto, kiu diskonigu la mondan situacion i.a. pere de “edukado.net”.

*(Germain Pirlot. 14/01/2015)*

## Esperanta klavaro fine ankaŭ por iPhone.

Post multjara atendado, ankaŭ uzantoj de iPhone fine povas fari tion, kio ekde la komenco estis natura afero por uzantoj de Android-telefonoj: tajpi Esperantajn literojn en ĉiuj programoj. Por ke Chuck Smith povu realigi tion, necesis atendi novan version de la operacia sistemo. Legu la kompletan informon en Libera Folio:
http://www.liberafolio.org/2014/esperanta-klavaro-fine-ankau-por-iphone

*(Darío Rodríguez. 04/01/2015)*

## Novaj E-KURSOJ kun instruisto, en Interreto, en grupoj de la Jagelona Universitato!.

Ni invitas diverslandajn esperantistojn al novaj E-kursoj okazontaj en Interreto vive, en studgrupoj gvidataj de universitata instruistino. Ĉi-foje oni povas elekti inter tri kursoj. Ĉiu el ili havas difinitan ĉefcelon, sed realigas ankaŭ plurajn aliajn celojn.

- **Kurso pri SKRIBADO** – supera nivelo
- **Kurso pri PAROLADO –** supera nivelo
- **Post-elementa lingva kurso “Forlasu la TERETAĜON!”**

Detalojn bv. vidi en la kompleta informo. Ĝi troviĝas en la anoncejo pri E-kursoj organizataj de la universitato por esperantistoj el la tuta mondo: goo.gl/x1S3AH (klaku) (aŭ https://docs.google.com/document/d/1rStQagmNzn5jxNmd2Bg9eB_dXfS3QAXY9xJwBtGkBUo/preview)

Lernu E-on ĉiusemajne kun interesaj kaj amikemaj esperantistoj el aliaj landoj,... restante en via hejmo!
Lernu en la sama universitato, en kiu studis Nikolao Kopernik kaj la posta papo, Johano Paŭlo 2.

*(Maria Majerczak. Gvidantino de la E-instruado en la Jagelona Universitato. 18/12/2014)*